

Rio Esperantista

Oficiala Organo de Asocio Esperantista de Rio de Janeiro

PENSO KAJ LABORO POR LA UNIVERSALA FRATECO

DIREKTORO: DELIO PEREIRA DE SOUZA

ĈEFREDAKTORO: LASZLO ZINNER

JARABONO	RIO DE JANEIRO, MARTO, 1948	Adreso: Caixa Postal 3677
BRAZILIO — Cr\$ 20,00		Redakcio kaj Administrejo
Eksterlande — U\$§ 1,50		Rua das Marrecas, 19, 2.º and
Aŭ 15 Respondokuponoj	JARO II	Monata eldono
Ekzemplero — Cr\$ 2,00		N.º 12
		Telefono 22-5300

Raporto de Asocio Esperantista de Rio de Janeiro Pri La Agado Dum La Jaro 1947

Ni elĉerpas interesajn partojn el la raporto de S-ano Doblas Filho, prezidinto de A.E.R.J. dum la jaro 1947-a.

... La prezidinto dankas la efikajn kunlaborojn de ĉiuj, kiuj helpis al li dum la jaro 47-a. Dum la jaro la movado estis sufiĉe granda, kiel oni povas konstati el nia memorlibro. La okazigo de 52 kulturkunvenoj elokvente pravas la gravecon de niaj kunvenoj. La kulturkunvenoj estis direktitaj de nia S-ano L. Zinner. La plej granda parto de la ellaborita materialo por la kulturkunvenoj aperis en nia oficiala organo RIO ESPERANTISTA. Du specialaj artaj festoj okazis ekster la Asocio kun la partopreno de eminentaj alilandaj muzikartistoj. Ĉio ĉi estas facile konstatebla el la ne plu aperanta "Informilo", kaj la nuna RIO ESPERANTISTA.

Sekretariejo. La ĝenerala protokolo registris 618 dokumentojn. Estis verkita 24 kunvenaj, 4 ĝeneralaj kaj 20 estrarkunven-protokoloj.

Kaso. Oni prezentas la bilancon por la jaro 1947. Pro la modele farita kaj prezentita laboro de la kasisto, S-ano Manoel Barbosa de Mello kaj la helpkasistino, F-ino Elza Travassos de Faria, la prezidinto ilin kore dankas kaj gratulas.

Biblioteko "Carlos Burler". Ĝi enhavas 460 librojn el kiuj 250 estas en Esperanto. En la biblioteko troviĝas gazeteltranĉaĵoj, gazetkolektoj, fotoj, poŝtkartoj kaj poŝtmarkoj.

Instrua Departemento. Oni sukcesis disdoni "ateston pri lernado" de Brazila Ligo Esperantista, al 23 gelnantoj. Oni komencigis diversajn kursojn kiuj ne finiĝis.

Propaganda Departemento. Ankaŭ ĉi tiu departemento laboris kontentige. La prezidinto rememorigis pri la morto de nia neforgesebla S-ano Virigilio Guajanás de Souza, kiu antaŭ la morto plenumis gravan taskon por tiu departemento. Nian sinceran omaĝon al lia karmemoro, al li kiu mortis la 7-an de septembro 1947.

Ekskursi Departemento. Okazis kelkaj ekskursoj inter kiuj la plej menciindaj estas tiuj al Barra Mansa kaj São Paulo.

Oficiala organo RIO ESPERANTISTA. Tri monatoj post la enoficigo de la nova estraro, oni decidis anstataŭigi la tiutempan multobligitan "informilo'on" per la 8 paĝa monata, presita gazeto sub la titolo RIO ESPERANTISTA. La oportunaideo proponita de S-ano Doblas Filho trovis viglan apogon inter la asocianoj. Jen la bilanco de la gazeto: (9 numeroj): Enspezoj: donacoj Kr. 10.591,90., jarabonoj Kr. 1.122,00., anoncoj Kr. 3.448,00., disvendado Kr. 239,50., prunto Kr. 400,00., sume Kr. 15.801,40. Elspezoj: presado Kr. 14.003,70., materialoj Kr. 314,00., monrekompencoj kaj poratdo Kr. 290,00., poŝtmarkoj Kr. 197,20., kliŝoj Kr. 409,70., prunto Kr. 400,00 — Kr. 15.801,40. La gazeton administris S-ano Delio Pereira de Souza al kiu la prezidinto elkore dankas pro ofta monhelpo kaj modela administrado de la organo. RIO ESPERANTISTA apartenas ne nur al la brazilaj esperantistoj, sed al la tuta mondo.

Finfine S-ro Doblas Filho dankis al ĉiuj kunlaborantoj, kiuj sincere kaj sindone laboradis pri la disvastigo de Esperanto.

La raporto estis laŭtlegita dum la anarkunveno, en la ejo de la Asocio, la 28-an de februaro, 1948.

AL LA ABONANTOJ

Post la sendado de tiu ĉi numero finiĝas la abonoj de la unuaj abonintoj, kaj la direktoraro de la gazeto atendas de ili ĉiuj novan abonon por la nova jarkolekto. Per la lastaj numeroj vi povas konstati nian grandan klopodadon, por plibonigi la gazeton kaj ĝian eldonadon. Ĝis nun ni havas 100 abonantojn. Tio estas sufiĉa nombro rilate al nia malforta enlanda movado, sed malmulte por la bezono de la gazeto. Tial ni klopodadas pligrandigi la nombron de la abonantoj, pere de via helpo-ĝis 500... Tiuj kiuj havas korespondantojn aŭ amikojn en Europo, povas aboni al ili laŭ la eksterlanda tarifo \$30.00. El Europo estas malfacila sendi abonmonon, kvankam

multaj deziras aboni nian gazeton. Do vi faru plezuron al viaj amikoj, kaj helpu la eldonon de R. E. Ankaŭ ni petas vin, vigne propagandi la gazeton. Ni bezonas 500 abonantojn, por ke ni ne havu konstante monzorgojn... En viaj Klubo, kunvenoj, inter la esperantistaro, ĉiam demandu, ĉu vi jam abonis RIO ESPERANTISTA-n? Se ne, demandu: kial ne? En ĉiuj grandaj esperanto Centroj troviĝas Perantoj de nia gazeto. Ni dissendas pli ol 700 ekzemplerojn tra la tuta mondo, al la Ligoj, Klubo, Grupoj; propagandcele. Ni do bezonas 500 abonantojn ek al la laboro!

NOVA DIREKTORO DE "RIO ESPERANTISTA"

Je la 1-a de marto 1948, dum la estrarkunveno de Asocio de Esperantistoj de Rio de Janeiro, elektis kiel Direktoro S-ano Delio Pereira de Souza, Prezidanto de nia Asocio.

LA ALIGO AL "UNIVERSALA, LIGO"
ESTAS DEVO DE ĈIU PACBATALANTO

Kiam Sokrato ekvidis la maksimumon, ore skribitan sur la templo de Apolono: "Konu vin mem", li komprenis, ke la filozofiaj sistemoj, spekulante pri la aĵ-kaŭzoj, estis farantaj laboron vnan, ne fruktodonan. Li estis do la unua filozofo, kiu sin dediĉis precipe al la ekkono de l'homo mem, iginte, per tio, la fondinto de la moralo aŭ moralfilozofio. Kiam iu demandis al li: "Kio estas la mondo?", li respondis: "Ekde kiam mi lernis pensi, mi alcelas nur la konon de mi mem, kaj mi ankoraŭ tute ne sukcesis ĉi-afere. Nur kiam mi estos atinginta la aspiratan rezultaton, mi eksploros ankaŭ la esencon de la ceteraj aferoj. Tiuj, tamen, tute ne gravas".

Li instruadis, ke la virto estas la plej granda posedaĵo de l'homo, kaj pro tio lia saĝeco kreskis tiamaniere, ke la Orakolo de Delfo, la voĉo de l'dioj, atestis, ke Sokrato estas la plej saĝa homo, la plej justa, la princo de la filozofio kaj la patro de la saĝeco. La orakolo opiniis lin tiel saĝa, ĉar Sokrato estis ĉiam konfesanta sian malklarecon, dirante: "Nur tion mi scias certe, ke mi scias nenion".

Foje oni demandis al li: "Kiu estas la plej mallonga vojo al la honoro?". Kaj lia respondo estis: "Klopodu esti tia, kia vi volus ŝajni". Ne ĉiam oni devas sin prezenti kiel la plej granda pekulo en la mondo. Ĉar la impostisto ne estas malpli antipatia ol la fariseo. Kial la homo ne povus esti same konscia pri siaj bonaj kvalitoj kiel pri siaj malvirtoj? Oni devas nur posedi tiujn ĉi, ne fierante pri ili.

En sia bela aŭtobiografio, Benjamen Franklin avertis nin, ke ĝi eble vekos en li vantecon. Franklin estis tamen tute malhavanta vantecon. Li diris, ke tiu ĉi sento certe enhavas iom da bono, kaj ke li ne konsideras malŝaĝe danki al Dio pro nia vantecon, same kiel ni estas farantaj pro aliaj bonaĵoj de l'vivo. Cetere, se la homo ne estus konscia pri siaj efektivaĵoj bonaj kvalitoj, kie do li povus trovi la motivon por fari ion bonan. Kvankam es-

SAGO TRA LA PASINTAJ JARCENTOJ

tas ja ĉiam ridinde imagi sin havanta certajn kvalitojn, kiujn oni vere ne posedas.

Al Guido Gezelle (*) neniu, certe, povas riproĉi la plej etan mankon de modesteco. Kiam, certfoje, iu estis dirinta al li, ke lia traduko de "The Song of Hiawatha" de Longfellow estis pli bela ol la originalo, li simple respondis: "Mi scias tion".

Ni revenu al la antikva epoko. Al Sostrato, la mond-fama greka arkitekto, kiun la egipta reĝo Ptolomeo venigis al Aleksandrio, por konstrui tie la lumturon, ekde tiam servantan kiel modelo por tiom da aliaj, oni riproĉis, ke li ne estis nobel-devena. Je tio Sostrato respondis: "Ĝuste pro tio mi ja meritas pli da respekto, ĉar la nobleco de mia familio komenciĝas de mi mem".

Sokrato, la filozofo, estis ĉiam komencanta siajn lecionojn per la vortoj: "Kion oni estas dirantaj pri via Majstro?". Kaj liaj disĉiploj, siavice, estis demandantaj: "Kion oni estas dirantaj pri viaj disĉiploj?". Ili do ne prinis onian babilaĉadon, sed opiniis, ke ĝi estas vere granda helpilo por povi rapide kaj ĝuste juĝi pri siaj propraj malvirtoj. Kiam Sokrato instruadis, kiamaniere oni povas plibonigi sin mem. Por sia verko, saĝa artisto profitas eĉ de la plej maljusta kritiko. Ĉiu homo devas samtiel agadi rilate al si mem.

Ekzistas, kompreneble, homoj, kiuj spontanee sciigas kiun kaj kion ili mem estas, sen iu ajn neceso, ke oni antaŭ demandu ilin pri tio. Mi ne mencias nomojn de tiaj personoj, sed mi donas la parolon al la famekonata rabeno Eleazaro, kvankam, por tio, ni devas forlasi la antikvan epokon, ĉar Eleazaro vivis dum la 13a jarcento.

Iam oni demandis al li: "Kial okazas tiel ofte, ke instruituloj havas tiajn malicaĵojn kaj kolerecajn edzinojn?". Eleazaro respondis: "Por ke tiuj, kiuj devas instrui al aliaj estu bone ekzercitaj, per siaj familiaj

ĉagrenajoj, por povi pli bone toleradi la publikajn malfacilaĵojn", (per kio oni konstatas, ke Eleazaro estis inspirita de Sokrato), "sed precipe, por ke, instruitaj pri siaj malfortajoj, de la respektivaj edzinoj, ili ne tro fieru pri sia instruiteco".

La filozofo Zopuro ŝajne estis eksterordinara homkonanto, kiu, per ununura alrigardo jam estis divenanta ies ajn karakteron. Kiam li estis vidinta Sokraton, oni demandis al li lian opinion pri tiu filozofo. Kaj li respondis: "Sokrato estas la plej malvirta homo en la mondo". Eksciinte pri tio, Sokrato diris: "Ho eminenta filozofo, vi bone konas min. Mi estas vere tre malvirtema, sed ĝuste la filozofio, la kono de mi mem, havigas al mi la necesan sinregon por ne fari malvirtaĵojn".

Estas necese aldoni, ke tiu valor-fiksado de si mem servis kiel bazo al la valor-fiksado de la homo ĝenerale konsiderata, kaj ke tiu homo sin prezentis do ne tre brila.

Kiam la roma imperiestro Adriano demandis al Epikteto: "Kio estas la homo?", la filozofo respondis: "Kandelo en la vento; pilko de la fatalo". Epikteto havis jenan devizon: "Suferu kaj malhavu". Komence li estis sklavo, kaj iam okazis, ke lia mastro estis kondamninta lin al korpa puno. Kiam la torturisto jam estis preta apliki la punon kaj estis tro firme ĉirkaŭpremita la torturilon, Epikteto diris al li: "Atentu, ne rompu vian torturilon!", kvazaŭ li ĉeestus sian propran turmentadon kiel nura rigardanto. Kaj kiam tiu ilo efektive rompiĝis, li simple diris: "Mi ja avertis vin!".

Pri Seneko, la roma filozofo, kiun la imperiestro Nerono kondamninta al memmortigo, oni rakontas, ke ĉiuvespere li estis detale ekzaminanta ĉion, kion li estis dirinta aŭ farinta dum la respektiva tago, por ke, pli bone konante sin mem, li povu ĉiam plibonigi sin. La pasinteco, tiamaniere, fekundiĝis

en la sekretoj de la homa koro.

Antusteno, la instruisto de Diogeno, estis iutage vizitata de sia plej bona amiko, kiu tiuhore estis plendanta pro la perdo de sia taglibro. "Estus preferinde, ke vi estus skribanta vian taglibron en la koro, ol sur papero", respondis la filozofo, "ĉar tiamaniere vi neniam estus perdinta ĝin".

Ke filozofoj tamen ne indulgas unu la alian pravas la sekvanta ekzemplo: Platono estis riproĉanta al Sokrato tro severan punadon de disĉiplo, okazintan en ĉeesto de familianoj kaj de aliaj disĉiploj. "Ĉu ne estus preferinde puni lin en nenies ĉeesto?", demandis Platono. Kaj Sokrato respondis: "Kian opinion do vi havas pri mi mem? Ĉu ne estus preferinde diri tion al mi en nenies ĉeesto?".

Iutempe la filozofoj tre fieris pri tiu sinkono. Certfoje la reĝo Dionizo demandis al Aristipo, kial la filozofoj tiom ofte vizitas la domojn de la riĉuloj, dum tiuj ĉi preskaŭ neniam vizitas la domojn de la filozofoj. Aristipo respondis: "Ĉar la filozofoj tre bone scias kio mankas al ili mem, do ili serĉas la domojn de la riĉuloj. Sed la riĉuloj ne scias kio mankas al ili, do ili evitas la domojn de la filozofoj".

Fine, sinkono estas la plej interesa parto de la vikonon, de nia vivsaĝeco. Ĝi estas eĉ ĝia plej necesa kondiĉo, kaj la vivkono mem neniam estas kompleta, do — neniam ankaŭ al la homkono kaj, seve, des pli neniam la sinkono.

G. B. Shaw, la pli-ol-naŭdekjara, eminenta angla verkisto, tute ne kontentigas per tioma aĝo kaj opinias, ke la normala homa aĝo devas esti proksimume tricent jaroj.

(daŭrigo sur la 3.^a paĝo)

(*) Flandra katolika pastro, unu el la plej grandaj poetoj. Liaj poemoj estas tiel simplaj, tiel naturaj, ke mi konas nenian poeton (ĉu flandran, ĉu germanan), kiu povus egali lin. La melodieco de liaj versaĵoj preskaŭ limtuŝas la supersaturecon. Tamen li estis modesta vilaĝa pastro. Lia modesteco igis proverba en nia lando. C. De Br.

Ahmeto Sur La Minaret'.

V. Velička.

"Dudek jarojn mi travivis"
Al si mem diris Ahmet',
"Sed al alta minaret'
Mi ĝis nun ne supreniris!"
Kaj al svelta minareto
Sin direktis tuj Ahmeto.

Antaŭ li kiel sur plado
Staras urbo: la bazar'
Nigraj suproj de l' arbar'...
De la homoj moviĝado...
Sajne estis ja insektoj
Kaj la homoj kaj la bestoj.

"— Dudek jarojn mi travivis,"
Ekkriegis tuj Ahmet',
"Nun de sur la minaret'
Nur hodiaŭ mi ekvidis
De la homo malgravecon
Ankaŭ mian superecon!"

Malproksime, en ludet',
La infanoj diskutadas:
"Jen, rigardu, ke staradas
Iu sur la minaret'!"

Kaj decidis infanklero:
"— Tio estas ja pasero!"

El rusa lingvo tradukis KOBO.

Sago Tra La...

(daŭrigo de la 2.^a paĝo)

roj, kaj ke nur je tia aĝo iom da matureco estas ebla.

Identite rezonadis Temistoklo, la eminenta militestro, kiu, malgraŭ tiu ĉi lia kvalito, estis ekzilita el sia patrujo, Ateno. Kiam li jam estis 107 jarojn aĝa kaj sentis sian vivon baldaŭ finiĝonta, li diris: "Mi tre bedaŭras, ke post nelonge mi devos forlasi la mondon, ĉar nur nun mi ekakiras iom da saĝeco kaj ekscias la signifon de la vivo kaj la manieron kiel ni devas kzi ĝin.

Cetere, vivkono tute similas aliajn sciencojn. Ksenokrato, disĉiplo de Platono, kvankam tre maljuna jam, treege sin interesadis pri sia skolo kaj disĉiplaro, — kio igis Eŭdemonidon demand-elkrii: "Kiam do tiu grizharulo estos sufiĉe saĝa?"

Ĝenerale oni diras, ke ĉiutage homo lernas ion novan. Ni esperu, ke ni povos lerni ĝis nia morto, preiĉpe pri ni mem, ĉar nur tiam ni sentas, ke ni vivas.

Cesar DE BRUYNE
Grand, Belgujo).

Se du homoj... havas tute aliajn morojn kaj vivaranĝojn, tiam ili rigardas sin kiel fremdulojn... instinkte evitas sin reciproke kaj al si malkonfidis, kiel oni instinkte malkonfidis al ĉio kio kaŝiĝas por ni en mallumo...

Forprenu de ni nian tutan civilizacion, kaj tiam niaj mensoj neniom diferencos de la mensoj de afrikanaj hommanĝantoj.

Zamenhof

F A R I G U
S U B T E N A N T O
D E
"RIO ESPERANTISTA"

KORESPONDI DEZIRAS

HUNGARUJO. — *Arpád Pölskey*. Budapeŝt, XI. Puskás tér 13. Pri radio teknikaj aferoj.
Miklós Abella. Budapeŝt, VI. Benczúr u 34, II.2. Kun komencantoj, certe respondos.

GERMANUJI. — *Karl Woznica*. (22b) Neuwied, Hofgrundchen 5. Franca zono. Pri Sud-amerikaj aferoj.

KONKURSO

Respondu la ĉi subajn demandojn kaj penu gajni unu el la tri libroj-premioj:

- 1-a Judoj sen Mono.
- 2-a La vivo de Zola.
- 3-a La Botistoj.

Respondojn ni akceptas el Brazilo kaj el la tuta mondo ĝis la 30-a de junio. Kaj jen la demandoj:

- 1-a Kiam fondiĝis la "Lingva Komitato?"
- 2-a Kiam kaj kiu fondis la "Internacian Scien-ian Asocion"?
- 3-a Kiu estis la unua esperantisto en Brazilo?
- 4-a Kiu estis la unua prezidanto de "Brazilia Klubo Esperanto"?
- 5-a Kiu esperantigis la libron "Infero" de Dante?

Ni ricevis la jenan petleteron:

BRAZILAJ SAMIDEANOJ ĈU VI HELPOS MIN ?

Mi deziras ricevi la muskojn de via malproksima lando, ĉar mi starigas universalan herbarion.

La rikolto de tiuj kreskaĵoj estas facila: ili kreskas ĉie. La sendado ne postulas specialan pakadon. La muskojn (sekiĝitaj pro la daŭro de la vojaĝo) oni enmetas en paperon kun slipo kiu surhavu: daton de la rikolto, nomon de la geografia regiono paj de la najbara loko, tipon de la kreskloko (arbaro, marĉo, roko, seka, malsaka kaj, se eble, la proksimuma alto). La dezirata kvanto estas unu, du plenmanoj, sel pli aŭ malpli estos akceptata.

Kompreneble mi repagos la sendkostojn aŭ dankos per naturo, poŝtkartoj, alĝeriaj dokumentoj (francilingve), poŝtmarkojn (kvankam mi ne estas filatelisto).

Eble via nomo fariĝos eterna, se vi eltrovos novan specon kiu estos nomata laŭ via nomo. Tio jam okazis al samideano en Kenia.

Samideanoj de la tuta mondo, ankaŭ mi akceptos dankeme ĉiun sendon de muskoj.

Adreso: Prof. F. Jelenc. Rue Eugène Etienne,
maison Colin Tlemcen (Oran).
Alĝerio.

NOVAĴOJ EL LA "URBO DE LA ROZOJ"

Dum la pasinta jaro unu post la alia la poŝtovicistoj kiuj deĵoras ĉe la ĉefa poŝtvicejo en Portland, ŝtato Oregon, rimarkis la seninterrompan alvenon de Esperanto-poŝtaĵoj el ĉiuj partoj de la mondo. La nomo de la sinjorino al kiu tiuj poŝtaĵoj estis adresitaj estas bone konata de la gepoŝtovicistoj ĉar tiu esperantistino dum longa tempo jam estas ilia koleginino.

Malrapide sed certe la scivolemo pri Esperanto pligrandiĝis. Subite la scivolemaj gepoŝtovicistoj decidis fondi grupon kun celo esplori la belajojn de la Zamenhofa kreitaĵo.

Sekve de tio la poŝtviceja grupo kunvenis unu posttagmezon ĉiusemajne pro tio ke la geanoj laboras dum la vespero aŭ nokte! Granda intereso estas elmontrata, kaj la partoprenantoj de la grupo diligente lernas Esperanton.

Instruante tian laboreman grupon, la skribintino povas vidi promesoplenan estontecon de nia komuna afero. Multaj bonvolaj gekunlabrantoj faciligas la taskon.

Cecilia P. Thomas,
Portland, Oregon. Usono.

Tra La Mondo

ISLANDO. — En Reykjavik denove estiĝas vigla esperanto-movado. Esperanto-Societo "Auroro" ekkomencis la laboron kaj petis la islandan ministerion pri edukado pri enkonduko de Esperanto en la lernejojn. La respondo de la ministro estis la jena; ke li estas preta proponi al la parlamento, ke Esperanto estu deviga studobjekto en la islandaj lernejoj, se la proksimaj landoj simile agos.

* * *

NORVEGUJO. — En Lofthus okazis Esperanto ferio somera por la unua fojo kaj sukcesis kun 60 partoprenantoj.

* * *

HUNGARUJO. — En urbo Pestszentflorincz oni oficiale baptis unu straton Esperanto. La urbo troviĝas apud Budapeŝto. La Budapeŝta Esperanto-Centro klopodas nomigi en ĉiuj hungaraj urboj stratojn per la nomoj Esperanto aŭ Zamenhof.

* * *

FRANCUJO. — La ministro pri nacia edukado ĵus permesis al du seminarioj en Besançon instrui Esperanton, sed ne devige, en la normala kurstabelo semajna.

* * *

ĈEĤOSLOVAKUJO. — Instruado de Esperanto en burĝaj lernejoj en Liberec. En septembro 1947 komencis oficiala instruado de Esperanto kiel laŭvola fako en ĉiuj burĝaj lernejoj de tiu urbo. 265 gelnantoj partoprenas la kursojn en kvar klasoj.

RECENZO

LA PRAHISTORIA ARTO. — Alia kajero el la serio "Enkonduko en la Kulturon" de ni ĵus ricevita. Ĝi, simile al la antaŭa kajero, estas leginda, instrua kaj interesa verko per kies legado oni povas pleniĝi la mankojn en siaj kultursciroj. Tamen, kelkaj neologismoj en priskribado de diversaj prahistoriaj periodoj aŭ epokoj igis nin pensi, ke estus konsilinde verki alian kajeron kun la titolo, ekzemple, "La Prahistoriaj Epokoj de la Homa Vivo" kiu sendube grandparte klarigus la neologismojn de la verko "La Prahistoria Arto" kaj nin ankaŭ instruus pri tiuj, ege malprecizaj, epokoj prahistoriaj.

KOBO.

* * *

SALUTON. — Propaganda broŝureto pri Ĉeĥoslovakio, 16 pĝ 10.5 x 15 cm kun kvinkolora bildeto sur ĉiu paĝo. Kreta papero. El. Esperanto-Asocio en ĈSR, Uralské nám. 9. Praha XIX. Prezo 15 Kčs, — eksterl. 3 respondkup.

Livros em Esperanto

Fako por librovendado de Asocio Esperantista de Rio de Janeiro:

	Cr\$
Primeiro Manual de Esperanto	3,00
Vida, Idéias, Lógica e Obra de Zamenhof	2,00
Essência e Futura da Idéia de Língua Internacional, em português	6,00
A mesma obra, em português e esperanto	8,00
Esperanto Sem Mestre, enc.	16,00
Método de Esperanto, cart.	9,00
Guia de Conversação, broch.	5,00
Esperanto Modelo, broch.	15,00
La Perfido, de Jong	25,00
La Hispana Tragedio, de Last	25,00
Kulio, de Szekely	25,00
Judoj sen Mono, de Gold	25,00
Patroj kaj Filoj, de Turgenjev	25,00
Vivo de Zola, broch.	15,00
Romano pri Afrika Bieno, de Schreiner	18,00
Fabeloj, de Anderson, 2 ^a 3 ^a partoj	30,00
La Fino, de Bernardotte	15,00
Glumarko Esperanto lingvo internacia, cento	6,00
" Oni korespondas Esperanto, cento	6,00
" Stelo traĵita de la vorto "Esperanto", cento	6,00
Poŝtkartoj kun verda stelo, deko	5,00
Leterkartoj kun verda stelo, deko	5,00
Leterpapero kun verda stelo, cento	18,00
Koverto kun la verda stelo	18,00

Os samideanos do interior não precisam remeter dinheiro, podem fazer os seus pedidos por meio de cartão postal, recebendo no correio pelo serviço de Reembolso Postal. Os cheques ou vales postais devem vir em nome do Tesoureiro, Sr. Manoel Barbosa de Mello, Caixa Postal 3677, Rio de Janeiro.

V. Excia. já pensou em adquirir seu **Calçado!**
Não o faça sem primeiro fazer uma visita
aos nossos mostruários e preços

CASA RAYON
RUA ARQUIAS CORDEIRO, 278
Fone 29-1359 (Meyer)

BREVE HISTÓRIA DEL ESPERANTO

Jen la titolo de la bonega hispanlingva 32-paĝa broŝuro pri la historio de internaciaj lingvoj. Sur la lasta paĝo troviĝas mallonga biografio de Zamenhof. Ĝi estas rekomendinda propagandilo por la hispanlingvanoj.

La sama eldonejo anoncas la eldononadon de 32-paĝa libreto, titolita "Lernu Esperanton". La libro estas dediĉita al tiuj, kiuj deziras koni ĝisfunde, paroli korekte, kaj skribi senerare nian lingvon. Ni ankoraŭ ne konas la libron. Prezo aŭfrankite 5 internaciaj respondkuponoj aŭ \$1 argentina peso. Mendu ĉe: Quarello & Cia., Casilla de Correo 47. (Suc.13). Buenos Ayres. Argentina Respubliko.

Ouçam às segundas-feiras, às 13,30 horas, na Rádio Difusora do Ministério de Educação, o programa em português da Dra. Ilka Duque Estrada.

Comprar bem Camisas, Robes, vestons e Pijamas

SO' NO



O CAMIZEIRO

Informoj Pri U. E. A.

Nova Statuto

Pro la kunfandiĝo I.E.L. — U.E.A. la nova asocio havas novan statuton. La nomo elektita estas la malnova: Universala Esperanto-Asocio, kaj la gazeto estas "Esperanto", fondita de H. Holder.

Ĝiaj celoj estas: disvastigi la uzadon de la internacia helplingvo Esperanto: plifaciligi la ĉiuspecajn moralajn kaj materiajn rilatojn inter la homoj, sen diferenco pri nacieco, raso, religio aŭ lingvo; kreskigi inter ĝiaj membroj fortikan senton de solidareco, kaj disvolvigi ĉe ili la komprenon kaj estimon por fremdaj popoloj; zorgi pri la kunagado de esperantistaj organizaĵoj; krei internaciajn servojn uzeblajn de ĉiuj homoj, kies intelektaj aŭ materiaj interesoj celas trans la limojn de ilia genta aŭ lingva teritorio; okazigi la Universalajn Esperanto-Kongresojn kaj aliajn kongresojn kaj konferencojn.

La sidejo, sekcio Administra-ĝvida, estas en Anglujo; la sidejo de sekcio por Servoj kaj dokumentado estas en Genève, Svisujo.

La landaj asocioj kaj internaciaj fakaj asocioj povas aliĝi al U.E.A., se ĝi havas la nombron da membroj fiksitajn en la Ĝenerala Regulo.

Komitato

La gvidado de la Asocio estas konfidata al la Komitato, kiel diras la 24a paragrafo; ĝi konsistas el:

Komitatoj A, elektataj de la aliĝintaj asocioj;

Komitatoj B, elektataj de la Delegitoj;

Komitatoj C, al-elektataj de la Komitatoj A kaj B.

Pridiras la paragrafo 25a:

"Ĉiu aliĝinta Asocio kun 200 ĝis 1.000 membroj elektas unu Komitatanon, kaj plian por ĉiu komencita milo. La nombro de la Komitatoj de ĉiu Asocio restas sen ŝanĝo dum la oficperiodo, se la eksigintaj kaj la mortintaj povas esti anstataŭitaj. Asocio, kiu aliĝas dum la oficperiodo, elektas Komitatanon aŭ Komitatojn por la resto de tiu periodo. Komitato restas dum la tuta oficperiodo, escepte se li ne plu apartenas al la Asocio, kiu elektis lin. Se la nombro de la Komitatoj A superas 10 personojn, la Komitato rajtas plialtigi la supre fiksitajn elektiferojn."

La Delegitoj elektas el internacia listo unu Komitatanon por 250 delegitoj; kaj por certigi al la asocio la kunlaboradon de spertuloj, la Komitatoj A kaj B povas kompletigi la Komitaton, elektanta pliajn Komitatojn C per sekrete voĉdono ĝis la kvarono de sia propra nombro. Salajrata oficisto de U. E. A. ne povas esti komitatanano.

La Komitato elektas inter siaj membroj la Prezidanton, la Vic-Prezidanton kaj la Estraron, kiu konsistas el la diritaj personoj kaj tri ĝis kvin pliaj Komitatoj; nomas la Ĝeneralan Sekretarion; fiksas la Ĝeneralan agadon de U.E.A.; akceptas Landajn kaj Fakajn Asociojn; starigas la regularojn; ekzamenas la financojn de la Asocio; decidas en kunveno

dum la Universala Kongreso pri la senŝarĝo de la Estraro rilate al la agado de la pasinta jaro; kaj decidas pri la aferoj nerezervitaj al aliaj instancoj. La Prezidanto reprezentas la Asocion; prezidas la Komitaton, la Estraron kaj la Kongresojn.

La estraranoj devas loĝi prefere en landoj ne tro malproksimaj de la Asocia sidejo kaj deklari sin pretaj partopreni la Universalajn Kongresojn kaj la kunsidojn de la Estraro. Tiu ĉi estas respondeca al la Komitato.

La Komitato kaj la Estraro laboras per cirkuleroj. La Estraro kunvenas en la Centra Oficejo almenaŭ unufoje ĉiujare kaj la Komitato okaze de la Universala Kongreso.

Oficejoj

Pri la Centra Oficejo priskribas la 35a. paragrafo:

"La sidejo de la Asocio estas gvidata de Ĝenerala Sekretario kun subsekretarioj laŭnecese. La Komitato nomas la Ĝeneralan Sekretarion kaj povas maldungi lin laŭ la leĝo de la lando. En okazo de urĝeco la Estraro rajtas doni laŭlegan averton, kiun konfirmas la Komitato. La Estraro fiksas la labor-kondiĉojn kaj salajron.

La Ĝenerala Sekretario administras la Asocion, klopodante disvastigi ĝiajn ideojn kaj plimulti ĝian membraron. Li sciigas la Prezidanton pri ĉiuj gravaj okazintaĵoj de al Oficejo, kaj submetas al li kaj al la Estraro la aferojn bezonatajn ilian aprobon aŭ pri kiuj Estrarano deziras informojn. Inicito de procesoj apartenas al la Estraro. La Ĝenerala Sekretario preparas la budĝeton.

Dokumentoj, en kiuj U.E.A. sin devigas al garantio, mendo aŭ pago je pli ol £50 devas porti la subskribojn de la Prezidanto aŭ de alia Estrarano kaj de la Ĝenerala Sekretario. Tio ne va-

lidas por la normala funkciado de la oficejo.

La oficistoj de la Centra Oficejo estas nomataj de la Ĝenerala Sekretario, kiu fiksas iliajn salajrojn laŭ la bezono kaj la oficeja kutimo. Li raportas al la Estraro por aprobo."

La oficejo en Genève servas kiel redakcejo, biblioteko kaj arkivejo.

La jarbilanco devas esti aprobita de la Komitato kaj publikigita, kaj la jara budĝeto de la Estraro.

Ĝenerala Voĉdono

Ĝenerala voĉdono povas okazi: se la Komitato aŭ la Estraro ĝin decidas, aŭ se aliĝintaj asocioj reprezentantaj kvaronon de la membraro ĝin postulas. Ĝin aranĝas la Ĝenerala Sekretario, kaj tiu voĉdono povas nuligi ĉiujn elektojn kaj decidojn, ŝanĝi la statuton kaj dissolvi la Asocion; en tiu okazo la havo estas donacata al alia Esperanto-Organizaĵo, kiun la decido indikas. La voĉdono estas skriba kaj ĝin kontrolas la Ĝenerala Sekretario, antaŭ tri membroj, kiuj kune certigos la korektecon de la procedo. La aliĝintaj asocioj havas tiom da voĉoj, kiom da siaj membroj.

Universala Kongreso

La Universala Kongreso estas internacia manifestacio de la Esperantistaro, kaj ĝi celas fortigi la solidarecon inter la samideanoj, progresigi la movadon kaj studi ĝiajn problemojn. La Estraro konfidas la aranĝon al Loka Kongresa Komitato, laŭ certaj kondiĉoj.

La Statuto enhavas entute 44 paragrafojn, kiuj klare pritraktas la aferojn.

D. Pereira de Souza
(Delegito de U.E.A.)

ESPERANTA MURKALENDARO

Ĉiamdaŭra, luksa, el bona ligno kaj kartono, laŭ la formato 30 x 20 centimetroj. — Prezo: Cr\$ 40,00.

Mendoj al ASSOCIAÇÃO ESPERANTISTA DO RIO DE JANEIRO, Caixa Postal 3677, Rio de Janeiro, Brazilo.

A. S. REZENDE

— Inĝeniero —

projektoj kaj antaŭkalkuloj por loĝdomoj, luksaj, hoteloj, hospitaloj, lernejoj, kaj aliaj konstruaĵoj.

Informpetoj en lingvoj portugala, franca, angla kaj Esperanta

Adreso: Caixa Postal 2917

Rio de Janeiro

Brazilo

Lastaj Novajoj

Pasintan monaton fondiĝis "Laborista Esperanto Grupo Odilon Machado" en Cachambi, Rio de Janeiro. Ĝia celo estas disvastigi Esperanton kaj kulturon inter la enloĝantoj de la citita kvartalaro. La estraro de la nova grupo proponas karmonian kunlaboradon kun ĉiuj jam ekzistantaj esperanto-grupoj kaj asocioj. Unu el la gvidantoj estas nia senlaca samideano Celso Rosa. Adreso de la grupo: Rua Basílio Brito, 67. Cachambi, Rio de Janeiro. Ni deziras plenan sukceson al la nova grupo.

* * *

"O Diário", tagjurnalo en Santos, ŝtato São Paulo, aperigis daŭre artikolon de profesoro Charles Richet, membro de pariza Scienca Akademio, pri "Tutmonda interkompreno kaj Esperanto". Samtempe la citita ĵurnalo aperigis novaĵojn pri nia movado el la tuta mondo.

* * *

La Spirita Federacio en Niterói, ŝtato Rio de Janeiro, sciigas nin pri la enkonduko de la daŭra instruado de Esperanto ĉe ĝia sidejo. La Esperanto Klubo de Niterói zorgos pri la instruistoj. Adreso: Rua Coronel Gomes Machado, 140. Niterói. Estado do Rio. Brazilo.

* * *

Niterói. — Je la 4-a de februaro okazis en la lernejo "BITTENCOURT SILVA" la inaŭguro de esperanto-kurso gvida de nia S-ano Octavio Vianna Peixoto, kiu zorgo klarigis al la ĉeestantoj la facilecon, logikecon kaj la belsonecon de Esperanto.

Solemnigis la inaŭguron la ĉeesto de S-ro Bittencourt Silva direktoro de la lernejo kaj S-ro Mario Ritter Nunes, Prezidanto de Niterói Esperanto Klubo. La "ASOCION" reprezentis nia redaktoro S-ano Wilton Ribeiro.

* * *

Esperanto Klubo "Everardo Backeuser" en São Francisco, ŝtato Santa Catarina, organizis novan kurson por 20 gelernantoj. La Klubo ankaŭ instruas aritmetikojn kaj la lingvojn angla kaj portugala.

PUBLIKIGAJ OJ RICEVITAJ

VERDA STELETO, n-oj 11 kaj 12. Torino, Italujo.
LA JUNA VIVO, n-ro 121, West-Grafdijk, Nederlando.
LA PROGRESANTO, n-ro 1, Amsterdam, Nederlando.
NEDERLANDA ESPERANTISTO, n-oj 12 kaj 1. Amsterdam, Nederlando.
SÃO PAULO ESPERANTISTO, n-ro 5. São Paulo, Brazilo.
SVISA ESPERO, n-ro 1. Svislando.
REFORMADOR, n-ro 1. Rio de Janeiro, Brazilo.
O REVELADOR, n-ro 10. São Paulo, Brazilo.
SEMISTO, n-ro 1. Mюнchen, Germanujo.
ESPERANTISTO SLOVAKA, n-ro 17 kaj 18. Trenčín, Ĉeĥoslovakujo.
RENOVIGO, n-ro 90. Meksikio.
LA RONDO, (multobligita) vol. 7, n-o 2. Melbourne, Aŭstralio.
LA RONDO, (presita) vol. 71 n-o 8. Melbourne, Aŭstralio.
PANORAMO DE NIA MOVDO, 16-paĝa broŝuro de S-ano Jozefo Joels. N-ro 102. Rio de Janeiro.
NATURA, n-ro 50. Lisbono, Portugalujo.
SUDA STELO, n-ro 6. Porto Alegre, Brazilo.
HEROLDO DE ESPERANTO, n-ro 1. Bruselo, Belgujo.
FLANDRA ESPERANTISTO, n-ro 1. Bruselo, Belgujo.
PACO KAJ JUSTECO, n-ro 12. Bruĝe, Belgujo.
AŬRORO, n-ro 3. Vizovice, Ĉeĥoslovakujo.
LA SUDA STELO, n-ro 2. Zagreb, Jugoslavujo.
LA S.L.P. FOLIO, n-ro 1. Novjorko, Usono.
CLUBE EXCURSIONISTA DE RAMOS, n-ro 22. Rio de Janeiro, Brazilo.
KLASBATALO, n-ro 22. Blaricum, Nederlando.
SKOLTA ESPERANTISTO, n-ro 4. Szegedo, Hungarujo.
LABORISTA ESPERANTISTO, n-ro 1. Amsterdam, Nederlando.

NOVA ESPERANTO LIBRO-VENDO SERVO

Vi povas aĉeti Esperanto-librojn je facilaj kondiĉoj. La ricevita katalogo enhavas pli ol 60 diversajn esperantolibrojn de diversaj eldonejoj. Postulu katalogon de S-ano Nelson de Souza. Caixa postal 3677. Rio de Janeiro, Brazilo.

EL AMAZONA REGIONO AL LA TUTMONDAJ GESAMIDEANOJ

Korajn salutojn gesamideanoj! Estas je la unua fojo, ke vi aŭdas voĉon el Amazonio en nia belsonega lingvo Esperanto. Ĝi, certe, ne estas ja stila voĉo esprimita per belaj skribaĵoj, sed vidu nur mian penson ĉerpita el la koro. La skribado elfluas kiel akvofalo, pli malpli tumultega. Kiam mi estis en brazila ĉefurbo, kiun mi forlasis en 1924, kaj tie lernis en portugala liceo kaj poste en monaĥejo Sankta Bento, mi aŭdis malbonajn informojn pri Amazonio. La Amazona regiono estis pentrita kaj vidigita same kiel portugala Afriko. Oni diradis, ke ĝi estis malsanulejo kaj malliberejo kien la aŭtoritatoj forsendas la ribelulojn. Sekve de tio mia animo ricevis malbonan impreson... sed la koro ne forgesis belajn verkojn pri Amazono. Mi ĉiam aŭdis pensis pri la mistera regiono kaj esperis iam ĝin vidi. Tiu dolĉa revo vivis ĉe mi kaj min akompanis.

Fine, post longa tempo, mia dolĉa revo realiĝis. Mi venis Manaus'on kaj sentis fali teren la malbonajn eldirojn de la aliaj. Jen mi estas, en la sukoriĉa tropika arbarego apud granda rivero. Miaj okuloj ekvidis la plej belan, la plej riĉan, la plej misteran arbaron de la mondo. Mi ĝojis kaj ĝojegis! Jen, kuŝanta sur la bordoj le la rivero Negro, la urbo Manaus, feino kun dolĉa kaj senfina rideto!

Mi ekvidis kaj ekamis la belan havenon, belajn konstruaĵojn kaj avenuojn, ĉarmajn ĝardenojn. La loĝantoj de Amazonio estas bonkoraj kaj laboremaj. Eknaskiĝas la industrio. La zorgo pri la popolsanecon estas tia, kia en aliaj lokoj: estas sanuloj kaj malsanuloj; mi ĝis nun restis sana.

Laŭ mia opinio, la Amazona regiono estas ĉiam la promesita

RIO-ESPERANTISTA
Propriedade da A.E.R.J.
Um jornal do Rio para o mundo

Enderêço: Caixa Postal 3677
Rio de Janeiro — Brasil
Redação e administração:
Rua das Marrecas, 19-2.º
Tel. 22-5300

Diretor responsável

Nelson Pereira de Souza

Gerente

F. Doblas Filho

Redator-chefe

László Zinner

Redatores

Konstanteno Blaščikov

D-ro Braz Cosenza

Wilton Ribeiro

*

EXPEDIENTE:

As importâncias referentes às assinaturas de RIO ESPERANTISTA, deverão vir em nome do nosso gerente, sr. F. Doblas Filho, bem como quaisquer quantias, vales-postais, cheques, etc.

*

La gazeto rajtigas tutan liberon al ĝiaj kunlaborantoj kaj ĝi ne respondecas pro la enmetitaj konceptoj en artikoloj subskribitaj.

Estas permesata la represo de la artikoloj, ĉu parte, ĉu tute — kondiĉe, ke oni citu la fonton.

brazila regiono de la espero por la bonaj kaj laboremaj homoj. Kiam vi pripensos pri vojaĝo, ne forgesu Amazonion. Ĝi estas pomprevida al koroj de la bonvolaj homoj.

S. Augusto.

Manaus, Amazonio. — Novembro, 1947. — Brazilo.

DÔR • RESFRIADOS

GUARAINA

NÃO ATACA O CORAÇÃO

UM PRODUTO • RAUL LEITE •

ANIAJ KULTURKUNVENOJ

Je la 21 de februaro, sub la gvidado de S-ano Laszlo Zinner, okazis speciala kunveno, kun la partopreno de la gelernantoj de S-anoj Aldino de Freitas kaj Paŭlo Ludka. Ankaŭ ĉeestis multnombre la anoj de nia Asocio kaj kelkaj gastoj.

Ĉi-kulturkunveno partoprenis ankaŭ S-ro Jozefo Joels kiu laŭtlegis antaŭ la atenta aŭskultantaro verkon de S-ro Cesar De Bruyne (el Gand, Belgujo), titolitan: "Saĝo tra la pasintaj jarcentoj", per kiu tiu ĉi klera belga samideano kaj granda amiko de nia Asocio kaj de nia presorgano komencas serion da interesaj kunlaboraĵoj, verkitaj speciale por ni, kiel kontribuado por niaj kulturkunvenoj kaj por RIO ESPERANTISTA. Ai S-ano Cesar De Bruyne ni sendas do la varman saluton de la Estraro de AERJ kaj de ĉiuj kunvenintaj samideanoj kaj nian dankon por la jam sendita kunlaboraĵoj, same kiel pro lia afabla promeso sendi pluajn similajn kontribuadojn por nia kultura laboro. Dankon ankaŭ al S-ano Jozefo Joels, pere de kiu ni sukcesis ekhavi tian kleran kaj interesan kunlaboranton. La laŭtlegitan artikolon de nia belga samideano ni aperigas en ĉi tiu eldono.

Sekve S-ano Blasĉikov laŭtlegis artikolon kiun sendis al ni S-ano Franz Kreutzberg el Germanujo (Köln — Mulheim) La titolo de la fabelo estas: "La koboldoj de Kolonjo". Ankaŭ ĝin ni aperigas.

S-ano Wilton Ribeiro laŭtlegis el Literatura Mondo (Budapest) poemon de Raymundo Schvarcz, fama pariza esperantisto-humoristo, titolita: "Salon kaj Pipron".

S-ano Délio Pereira de Souza laŭtlegis el "Svisa Espero" interesan artikolon titolitan "Protesto de Infano". Pro ĝia interesa enhavo kaj mallogeco, ni ĝin represas:

"En Denaska Esperantisto" ni legas:

Infana Malaprobo de denaskulo, kies sola lingvo estas Esperanto.

En 1937 okazis en Zagreb Esperanto - Kongreso, kiun

NOVA SĔDE

A Diretoria da Associação Esperantista do Rio de Janeiro está empenhada em conseguir nova sêde, onde possa, com eficiência, manter cursos de Esperanto, realizar reuniões culturais e propagar os ideais de fraternidade por meio da língua auxiliar neutra, que visa, acima de tudo, a fraternidade entre os homens.

Nesse sentido, está sendo realizada uma campanha junto das associações culturais e progressistas, a fim de que cada um preste o possível auxílio, para que em breve a Associação possa ter sêde condigna para realizar o seu programa.

Dêsse modo, RIO ESPERANTISTA faz, à tódas as pessoas simpáticas ao Esperanto e que se encontram nas citadas sociedades, o mais caloroso apêlo para que a campanha ora iniciada pela Diretoria da Associação encontre a melhor acolhida.

Devemos esclarecer que para a nova sêde, embora alugada, precisa a Associação de quantia apreciável, para conseguir um contrato em condições, compra de móveis, enfim, tódas as instalações necessárias.

Em o próximo número deste mensário, publicaremos o primeiros donativos recebidos.

ĉeestis proksimume 700 personoj. Mia edzino kaj mi ĉeestis, kunpreninte ankaŭ la malgrandulon. La stacidomo de Zagreb estis jam plena de samideanoj, kiuj, aŭdante infanon paroli Esperanton (ĉar li ĉion demandis) ekad miris kaj entuziasmiĝis tiom, ke ni ne povis liberiĝi de ili... Dum malfermo de la kongreso salutvortojn parolis iu samideano en nacia lingvo, kaj dum granda silento leviĝis nia heroo (li estis 20-monata) dirante kiel eble plej laŭte: "Paĉjo, kion palolas tiu homo? Mi komprenas nenion: ni ilu hejmen!" Kvazaŭ bombo, tiuj vortoj frapis la aŭskultantaron; estiĝis granda entuziasmo kaj oni povis daŭrigi la kongreson nur post 15-minuta granda bruoj.

Fine S-ano Sylla Chaves deklamis, lerte kaj pasie, "La Vojo'n" de Zamenhof.

ĈERPAĴOJ EL MALNOVAJ ESPERANTAJ GAZETOJ

La dek devoj de la esperantistoj

- 1.) Bone sciu la lingvon, traktu ĝin kun respekto, kaj lasu la versfaradon al la poetoj.
- 2.) Esperanton uzu parolante, studu legante kaj ne fuŝu skribante.
- 3.) La plibonigistoj diskutu; vi Fundamenton sekvu kaj fidele restu.
- 4.) Propagandu ĉiam, ne ĉie; Klarigu, ne prediku; rakontu faktojn, ne esperojn.
- 5.) Kion vi povas lerni nur en unu semajno, ne instruu en unu horo; el malgravaĵoj ne faru regulon, kaj el la regulo ne faru malgravaĵon.
- 6.) Verkante en Esperanto ne kedu interesa, kion nacilingve neniu legus; ne imagu, ke preseraroj plibeligas libron, ne malesperu, se mankas aĉetantoj.
- 7.) Al grupo aliĝu; la kunvenon vizitu; Esperanton parolu.
- 8.) Atentu, ke internacia lingvo vivas nur per uzado; memoru, ke tial internacia organizaĵo estas necesa, senlace varbu por U.E.A..

SAMIDEANO GEORGES SAGET estas organizanta grandan ekspozicion de esperantaj poŝtaĵoj, prezentotan dum la Kongreso de la Normandaj Esperantistoj. Por pli granda brilo de la brazila stando, oni petas al ĉiuj gesamideanoj sendi al li esperantajjn poŝtmarkojn kaj glumarkojn, kaj poŝtkartojn kun esperanta teksto. (Adreso: S-ro Georges Saget, 8 rue Buérot, Elbeuf (S. I.), Francujo.

9.) Legu gazeton, por ke vi konu novajn faktojn; abonu, por ke ĝi povu ekzisti; kunlaboru, por ke ĝi estu interesa.

10.) Por Esperanto kiel Movado agu; por ĝi kiel realaĵo pagu, kaj kiel altan Idealon konservu ĝin en via koro!

("Amerika Esperantisto", Septembro 1927-a.)

Lingva Studo
Bleki

Per ĉi tiu ĝenerala vorto ni nomas la parolon (krion de la bestoj). Sed la diversaj bestoj diversmaniere blekas, kaj tial ni uzas ankaŭ diversajn vortojn, kiuj formiĝis el la imitado de la bestaj sonoj.

- Jen tiaj vortoj:
- La hundo bojas.
 - La kato miaŭas.
 - La bovo muĝas.
 - La ĉevalo henas.
 - La porko gruntas.
 - La koko kikrikas.
 - La kokido pepas.
 - La kokino klukas.
 - La urso grumblas.
 - La lupo hurlas.
 - La elefanto trumpetas..
 - La muso cincas.
 - La abelo zumas.
 - La korvo ĝrakas.
 - La rano kvakas.
 - La serpento sviblas.
 - La grilo ĉirpas.
 - La turto kveras.
 - La kolombo rukulas.
 - La cikonio klakas.
 - La strigo ululas.
 - La pigo babilas.
 - La kukulo kukas.
 - La vanelo kvikas.
 - La mevo krias.
 - La najtingalo kantas.

(El "La Praktiko")

(Represita en "Argentina Esperantisto", Dec. 1937).

DR. ADOLPHO STAERKE
Livre docente da Universidade do Brasil
Clínica de senhoras
Residência: Consultório:
RUA BELA S. LUIZ, 68 R. ASSEMBLÉIA, 58-1:
Tel. 48-5892 Tel. 42-3835

PALACE MÓVEIS
Exposição permanente de Móveis de fino gosto
P. M. RAWET & CIA. LTDA.
Pc. das Nações 184 — R. Cardoso de Morais 506-A
Bonsucesso RIO DE JANEIRO Ramos

Rio Esperantista

Orgão oficial da A E R J.

PENSAMENTO E TRABALHO PELA FRATERNIDADE UNIVERSAL

Diretor: Delio Pereira de Souza

Redator-Chefe: László Zinner

Assinaturas:

Brasil — Cr\$ 20,00
Exterior — U\$ 1,50
Ou 15 Coupões-Resposta
Avulso — Cr\$ 2,00


Rio de Janeiro, Março de 1948

ANO II — Edição mensal — N.º 12

Enderço: Caixa Postal 3677

Redação e administração
Rua das Marrecas, 19, 2.º and
Telefone 22-5300

Ekskurso Al "Sepetiba"



S-ano Joaquim Antonio Cabral, brazila maristo, fiere tenas en la manoj la Esperantan standardon, dum la ekskurso okazinta la 25an de Januaro al la belega marbordo "Sepetiba". Ĉeestis multaj gesperantistoj. Gvidis S-ano O. S. Lopes.

ESPERANTO EN HUNGARA UNIVERSITATO

Dum la dua sesmonato de la studjaro 1947 oni oficiale enkondukis instruadon de Esperanto en la universitato de Szeged. Kiel lektoro oni komisiis samideanon Erno Farkas kiu instruis la lingvon al 18 gestudentoj el kiuj 15 estis kandidatoj je profesoroj. La sesmonaton de le venonta studjaro S-ro Erno Farkas instruos la lingvon entute 4 horoj ĉiusemajne.

Profesoro Farkas, ĉe la Universitato mem, fondis seminarian Esperanto-bibliotekon. Estas konsilinde sendi al tiu biblioteko multajn esperantaĵojn ĉu librojn ĉu revuojn ĉu gazetojn ĉu artikolojn kiuj rilatas ĝenerale al la internacia lingvo. La biblioteko kore dankos ĉiujn sendaĵojn. Adreso: Esperanta Lektorato, Bölcsész-kar, Ady-tér. Szeged. Hungarujo.

Lego — Konkero

La problemo de nia dudekjarcenta krizo, ŝajne treege malsimpla kaj komplika, enhavanta centojn da enigmoj naciaj, teritoriaj, religiaj, sociaj, ekonomiaj, politikaj kaj kulturaj, povas esti reduktita al jenaj malmultaj, simplaj eldiroj.

1. Laŭ la instruoj de historio, ni scias, ke konfliktoj kaj militoj inter la sociaj unuoj iĝas neeviteblaj kiam ajn kaj kie ajn aroj da homoj kun egala suverenpovo ekkontaktiĝas.

2. Kiam ajn kaj kie ajn la sociaj unuoj, en iu kampo, estu kia ajn ilia granda kaj karaktero, ekkontaktiĝas kaj la rezultigita interfrotado okazigas militon, ni scias, ke tiuj konfliktoj estis ĉiam malaperigitaj post kiam parto de la suverenpovo de la intermilitintaj unuoj estis transigita al alia, supera socia unuo, kapabla krei laŭlegan ordon; al la registara aŭtoritato, sub kiu la antaŭ militintaj grupoj fariĝas egalrajtaj membroj de iu pli vasta socio interne kies limoj la konfliktoj inter la grupoj povas esti kontrolataj kaj elradikigataj per laŭlegaj rimedoj, ne uzante la forton.

3. Kaŭze de tiu sperto ni scias, ke interne iu aro da individuoj, estantaj en kontakto kaj interkomunikado unuj kun la aliaj, konflikto iĝas neevitebla kiam ajn kaj kie ajn la suverenpovo konsistas el unuopaj membroj aŭ aroj da socimembroj kaj ne el la socio mem.

4. Plue, ni scias, ke malgraŭ tujaj kaj ŝajnaj motivoj de la konflikto inter la militintaj grupoj, tiuj kaŭzoj ĉesas produkti militon kaj perfortajn konfliktojn nur tiam, kiam oni starigas laŭlegan ordon, nur tiam, kiam la sociaj grupoj en konflikto sin trovas submetitaj al iu supera

leĝsistemo kaj, ke ĉiukaze kaj ĉiufoje, la rezultato de tia supera leĝsistemo estas ĉesigi uzadon de la perforto inter la ĝis tiam militintaj grupoj.

5. Sciante, ke militoj inter la malkonsentemaj sociaj grupoj kontaktigantaj estas neeviteblaj, ke la kunezisto de tiaj suverenhavaj sociaj grupoj ĉiam kaj ĉiukaze kondukis al milito, ni devas kompreni, ke paco inter la homoj, inter la individuoj aŭ inter la aroj da individuoj, en iu ajn sfero, estas rezultato de la laŭleĝa ordo. La paco estas identa kun la ekzisto de la leĝo.

6. Tial ke la dudekjarcenta krizo estas mondampleksa luktimaco inter la sociaj unuoj de la suverenhavaj nacioj-ŝtatoj, la problemo de nia epoko estas starigi laŭlegan ordon por povi reguligi rilatojn inter la homoj, inter kaj ekster la nacioj-ŝtatoj. Tio ja postulas, ke oni transigu parton de la suverena aŭtoritato de la naciaj militemaj institucioj al la institucioj tutmondaj, kapablaj starigi leĝojn kaj ordon en homaj rilatoj, inter kaj ekster la nacioj-ŝtatoj.

Ĉi tiuj eldiroj estas simpla reduktado de unu longa vico de la okazintaĵoj en nia historio je elementan formulon. La tasko antaŭ ni ne estas io unika. Ĝi estas pli unu paŝo en la sama direkto, plua paŝo de nia evoluo.

Ke la kondiĉoj en niaj nuntempaj socioj devigas nin realigi tiun paŝon, ĉiu devus bone kompreni.

Dum unu nur generacio du mondmilitoj suferigis la homaron, haltigis pacan progresadon kaj kripligis liberan, demokrateman vivmanieron de la tuta Okcidenta mondo. Malgraŭ la deziro ĉe la plejmulto de la popoloj vivi kaj labori pace, ni malsukcesis nin savi de la milito. Dum pli ol tri jardekoj ni estis observantaj la ĝis tiam nesuperitan putriĝon kaj ruiniĝon de nia civilizacio.

Por povi elteni tiun eksterordinaran lukton, ni devis nin submeti, je la grado ĝis nun nekonnata, al seniĝo, malaltiĝo suferoj, ni estis devigitaj subite ŝanĝi nian civilizitan vivmanieron. La plejmulto de la tuta homa gento estis submetita al la regularigo, diktatoreco, timo kaj sklavigo.

Elĉerpaĵo el la dekkvina ĉapitro de la libro "La Pacanatomio" verkita de S-ro Emery Reves.

El angla lingvo esperantigis K. Blasĉikov (Kobo).